

# *Ora Ĵurnalo*

*ĴURNALO, KIU NE APERAS ĈIUTAGE, SED LEGBLAS ĈIUTAGE*

Numero 84, Majo 2025



Kastelo de Överås.

Magazino por kulturo kaj plezuro

*Bonvolu viziti nian retpaĝon:*

**[www.esperanto-gbg.org](http://www.esperanto-gbg.org)**

# Enhavo

Enhavo.....	2	God morgon!.....	12
Pri Ora Ĵurnalo.....	2	Al konata pentristo, <i>Tatyana Auderskaja</i> .....	13
Espeporko meditas.....	3	Alingsås, amuza urbo!.....	13
Hajkoj inter printempo kaj somero.....	3	I Alingsås värnar man om äldre .....	15
La fantoma palaco en Överås.....	4	Esperantistoj en la Paraíba-valo, Brazilo, <i>Paulo Viana</i> .....	16
Spökslottet på Överås .....	4	La lastaj tagoj de L.L. Zamenhof, <i>Ronald Schindler</i> .....	17
Aino en vojaĝo al Tallinn, <i>Ulla Luin</i> .....	5	<i>El Ĉio estas tie de Göran Grip</i> .....	17
Iomete pli pri nia gotenburga klubano Aino Åberg.....	6	<i>Ur Allting finns av Göran Grip</i> .....	17
Koko de mallee, <i>Aino Åberg</i> .....	6	La porka milito, <i>Lottie Ericson</i> .....	22
Nordia kunlaboro inter esperantistoj dum la 2-a Mondmilito, <i>Soile Lingman</i> .....	8	Adiaŭ al Orm la Ruĝa!.....	23
Memma – finsk påskdessert .....	9	Orm la ruĝa kaj liaj egaluloj .....	24
Pri kalorioj .....	10	Röde Orm och hans gelikar.....	24
Laponia pentristo Reidar Särestöniemi, <i>Raita Pyhälä</i> .....	10	Aprila mateno ĉe torfmarĉo, <i>Jan Hellström</i> ..	25
Bonan matenon! .....	12	En aprilmorgon vid en mosse, <i>Jan Hellström</i>	25

## Pri Ora Ĵurnalo

*Ora Ĵurnalo* estas eldonata de Esperanto-Societo de Gotenburgo por subteni la esperantobibliotekon en Stannum, Östadsvägen 68.

Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79,  
siv.burell@gmail.com kaj Ingegerd Granat, 073-502 53  
32, ingeagerd.granat@gmail.com.

Fina paĝaranĝo: Andreas Nordström,  
arendsian@hotmail.com.

Limdato por manuskriptoj estas la 1:a en ĉiu monato.  
Ni deziras kontribuojn pri kulturo, naturo, lingvo,  
vivstilo, sano, manĝaĵo kaj rakontoj en diversaj temoj.  
La venonta numero estos por du monatoj, junio kaj  
julio.

*Ora Ĵurnalo* n-ro 84 ankaŭ troviĝas en versio por la  
poŝtelefono ĉe [www.esperanto-gbg.org/84](http://www.esperanto-gbg.org/84)



*En 29 marto estis parta suneklipso super la nordatlanta regiono. Mi esperis vidi ĝin sed kiam la tempo proksimiĝis al la ĝusta horo la nuboj kolektiĝis. Feliĉe la suno videblis jen kaj jen inter la nuboj. Ne rigardante al la suno mi proksimume direktis la poŝtelefonon al ĝi kaj sukcesis kapti la fenomenon post kelkaj provoj. – Andreas*



## Espeporko meditas



- ☼ En ĉi tiu numero vi povas legi **pri porko**, kiu en la 19a jarcento preskaŭ **kaŭzis militon inter Kanado kaj Britio**.
- ☼ **La plej malnova amiko de Aino Åberg, Ulla Luin**, loĝanta en Stokholmo, sendis memoron pri Aino. Ankaŭ Aino komence loĝis en Stokholmo post sia transloĝiĝo el Finnlando al Svedio. Antaŭ ol Aino flue parolis la svedan, esperanto estis ilia komuna lingvo.
- ☼ En Gotenburgo troviĝas **Societo de finnaj militinfanoj**. Kiam estis milito en Finnlando, multaj gepatroj sendis siajn infanojn al Svedio. **Soile Lingman** rakontas pri sia sperto de tiuj jaroj. La societo malkreskas, ĉar kompreneble novaj membroj ne venas. Ĉiuj ja nun estas maljunaj.
- ☼ Du personoj skribis **pri pentristoj – Tatyana el Ukrainio** skribis poemon pri pentristo kaj **Saliko** rakontis pri Reidar Särestöniemi, aparta pentristo.
- ☼ **Pri fantomo** en la bela konstruaĵo Överås en Gotenburgo, **skribis Ingegerd**.
- ☼ Unu kontribuo povus krei diskuton – la eltiraĵo el la libro **Ĉio estas tie** de

Göran Grip, sendita de **Roger Nilsson**. Diskuto kun respekto vigligas, ĉu ne? Ankaŭ **La porka milito** povus krei diskuton, laŭ mi.

- ☼ Kaj mi ne povis ne skribi pri mia nova loĝloko **Alingsås**.
- ☼ Kaj fine: **ni forlasis la vikingan libron pri Orm la Ruĝa** kaj Zoom:e restartos en aŭgusto. Estu bonvena!
- ☼ **La flava paperfloro** plej supre, kiun nia reĝino aĉetas sur la bildo, estas la versio de la maja floro por la jaro 2025, iam lanĉita por kolekti monon, celita al malriĉaj kaj malsanaj infanoj. Lernejoj vendas ilin.
- ☼ Oni diras ke la **somero** jam estas ĉi tie en grandaj partoj de Svedio **pro la ŝanĝiĝo de la klimato**. La somera numero de Ora Ĵurnalo kiel kutime estos duobla numero por junio–julio.
- ☼ Sed unue ni havos **someran kurson 23–25 majo** sur la insulo **Öckerö** ekster Gotenburgo. Bonvenon!!!.... Ĝis aŭgusto!

/ Siv

## Hajkoj inter printempo kaj somero

Restu raneto  
ne timu  
estas ja mi, Issa

Issa



*Netsuke, japana tradicia butono, de maljunulo kun rano surŝultre.*

Do – malaperis  
ankaŭ ĉi tiu printempo  
antaŭ ol mi povis ekvojaĝi

Kyoshi

# La fantoma palaco en Överås

## Spökslottet på Överås

de Ingegerd Granat



Estas streĉe preterpasi la malnovan pastran seminarion dum la krepuskaj horoj. Kiu vere scias, kio kuŝas inter la ĉielo kaj la tero?

Estis James Dickson la pli juna kiu konstruis la palacon en 1861, la palacon kiu iĝis tiel fama pro siaj fruktoj kaj berplantejoj. En 1873, al Överås estis premiita medalo en Vieno por elstaraj vinberoj kaj fruktoj.

Sed kial oni nomas ĝin "fantoma palaco"? – Nu, la familio Dickson zorgis pri sola dana knabino, kiu estis graveda. Ŝia familio volis ke ŝi nasku diskrete. La bebo naskiĝis, sed post kelkaj tagoj la bebo estis trovita morta en sia lito.

La dungitoj ĉe la palaco akuzis la knabinon pri sufokado de la kompatinda infano, sed kiam la tribunalo diris sian vorton, ŝi estis malkondamnita. Estas kompreneble, ke la dana knabino sentis sin malfeliĉa, kia ajn estis la situacio kun la infano. Iom poste, ŝi pendigis sin en la subtegmento ĉe Överås.

Det är spännande att ta sig förbi det gamla prästseminariet under skymningstimmen. Vem vet egentligen vad som finns mellan himmel och jord?

Det var James Dickson den yngre som uppförde slottet 1861. Slottet som blev så känt för sina frukt- och bärodlingar. Överås kunde år 1873 tillgodoräkna sig en medalj i Wien för utmärkta druvor och frukter.

Men varför kallas det då för "spökslottet"? – Jo, familjen Dickson tog hand om en ensamstående dansk flicka som var gravid. Hennes familj ville att hon skulle föda diskret. Barnet föddes, men efter några dagar hittade man barnet dött i sin säng.

De anställda på slottet anklagade flickan för att ha kvävt det stackars barnet men när rätten sagt sitt frikändes hon. Man kan förstå att den danska flickan kände sig olycklig, hur det nu än var med barnet. En tid därefter hängde hon sig på vinden på Överås.

Estas pluraj gastoj, kiuj asertas, ke ili aŭdis, vidis kaj spertis neklarigitajn eventojn. Dungito en la 1920-aj jaroj rakontas:

En la plej unua somera vespero kiam li alvenis tien, li aŭdis pri la malfeliĉa danino kaj ŝia infano, kaj kiam li poste estingas la lumon por iri dormi, li aŭdas iun brui kaj fari malordon en la subtegmento. Tiam li aŭdas paŝojn sur la ŝtuparo. Kaj kun teruro, li vidas la pordan tenilon malsupreniri. Li elspiras kiam ĝi denove supreniras. La Nigra Damo, kiel ŝi estis konata, baldaŭ iĝis iun por kulpigi se io fuŝiĝis aŭ rompiĝis. Kvankam la personaro ĉe Överås diris, ke nun estas kviete kaj trankvile en la kastelo, mi ne scias ĉu mi kuraĝus dormi tie por nokto.

– Ĉu vi?



Det finns flera gäster som säger sig ha hört, sett och upplevt oförklarliga händelser. En anställd på 1920-talet berättar:

Redan första sommarkvällen han kom dit fick han höra talas om den olyckliga danskan och hennes barn och när han senare släcker lampan för att sova hör han hur någon bullrar och stökar uppe på vinden. Därefter hör han steg i trappan. Och till sin fasa ser han hur dörrhandtaget

går ner. Han pustar ut när det går upp igen. Svarta Damen, som hon kom att kallas för, blev strax någon att skylla på om något gått fel eller sönder. Även om personalen på Överås sagt att det numera är lugnt och fridfullt på Slottet så vet inte jag om jag skulle våga sova över där en natt.

– Skulle du?



## Ulla Luin, unu el la plej malnovaj amikoj de Aino skribas pri memoro el 1970

Foto pri Ulla de 2005

### Aino en vojaĝo al Tallinn

En la mezo de la 1960-aj jaroj mi konatiĝis kun Aino, kaj ŝi restis grava amikino de mi dum multaj jaroj, ĝis kiam ŝi mortis en marto 2025.

Komence de la 1970-aj jaroj, Aino demandis al mi, ĉu mi povus iri kune kun ŝi kaj alia esperantistino al Tallinn, kaj mi diris jes sen pripenso. Mi nur sciis, ke Tallinn estas nomo de urbo ie ĉe la Balta maro. Baldaŭ poste mi rimarkis ke necesas specialaj preparoj, ĉar Estonio troviĝis en Soveta unio, kaj tiu vojaĝo estis iom speciala.

Ankaŭ por Aino la vojaĝo estis speciala. Ŝi atentis lerni iom de la estona lingvo antaŭ la vojaĝo, kaj ŝi rapide lernis iom, ĉar estas similecoj inter ŝia propra finna lingvo kaj la estona.

Dum tiu vojaĝo ni konatiĝis kun juna estona esperantistino, Lembe. En la posta decembro Lembe skribis leteron al mi, kun iom da aktualaj notoj pri si mem, kaj demandis, kiel fartas Aino. Mi telefonis al Aino, kaj Aino diris, kion mi salutu al Lembe, kaj mi skribis leteron al Lembe pri mi mem kaj pri Aino. Dum multaj decembroj ni poste faris tiel.

Aino kaj Lembe renkontiĝis unu plian fojon, en la kongreso de esperanto en Svislando, al kiu Lembe ekhavis eblecon veturi. Ankaŭ mi estis en tiu kongreso, kaj povis paroli kun Lembe. En la decembraj leteroj, Lembe ĉiam interesiĝis pri informoj pri Aino.

## Iomete pli pri nia gotenburga klubano Aino Åberg, kiu forpasis la 13an de marto 2025

La foton mi (Siv) faris en 2007... aŭ 2008?

Ni havis esperanto-kurson ĉe la studronda organizo Vuxenskolan.

Aino plej dekstre en la bildo.

La aliaj: Jan, Ralf; Helfrid, Monica, Margareta; Britta kaj Birgitta.

Unu tasko estis skribi fantazian rakonton pri bildo. Aino elektis bildon pri viro, kiu kuŝas sur enorma birdonesto, meze en torento. Ŝi skribis pri konflikto en lia familio. Li estis forpelita kaj iris al malnova amiko, kiu havis fiŝkaptokompanion.

Aino estis grava persono ankaŭ en la vivo de estona esperantistino.

/ Ulla Luin (en Tyresö)



La amiko ofertis al li novkonstruitan "neston" de kie li povis gardi la fiŝojn, kaj li akceptis.

Aino bone verkis, sed ne ofte volis skribi ion, ekzemple por Ora Ĵurnalo. Sed sprite ŝi volonte buŝe rakontis.

/ Siv

## Koko de mallee

de **Aino Åberg**, rakonto el la *Merkreda studogrupo*, gvidita de Aira Kankkunen inter 1995–2001. Ĉi tiu rakonto estas el la kolekto *El Nia Bestoĝardeno* (2000).

Antaŭ multaj jaroj mi legis libron pri la kondutaro de bestoj. Multe fascinis min la kokoj kaj kokinoj de mallee (*Leipoa ocellata*). Ili vivas en la sudokcidenta seka parto de Aŭstralio, en t.n. mallee-arbetaro. La birdo similas al fazano kaj ĝi estas samgranda kiel hejmigita kokino, sed ĝi havas multe pli grandajn piedojn. Pro tio oni nomas tiun birdofamilion megapodo (*megapodiæ*), kiu estas greka vorto por granda piedo. Ovo de megapodo pezas ducent gramojn. Dum kovadoperiodo kokino demetas tridek ovojn, po unu semajne. Ĉiu ovo estas kovata sep

semajnojn. Tio signifas, ke aro de la ovojn fariĝas tro granda por ke la birdo mem povu varmigi ion per sia propra korpo. Sed tiu birdo estas genio.

La koko pretas labori kiel frenezulo dum dekunu monatojn por savi sian idojn, ĉar ĉiam ja estas la koko, kiu laboras. Ĝi konstruas "maŝinon" por elkovi ovojn kaj komencas sian laboron dum vintro, jam duonjaron antaŭ la ovometado. Per siaj grandaj piedoj ĝi fosas kavon en sablejo, duonan metron profundan, trimetran


diametre. En tiun ĝi kolektas vegetaĵojn. Ĝia labortereno povas etendi unu aŭ duonan hektaron. Vintra pluvo helpas putradon kaj varmigon de la kompoŝto. Okaze de ne pluvada vintro la birdo rezignas nestadon.

Dum frua printempo mallee-koko revenas al sia kavaĵo. Nun ĝi elfosas kaj renversas la tutan enhavon multfoje ĉiutage. Iom post iom ekzistas ĝusta varmo, 33° C, en tiu substanco. Tiam la koko kovras la kavon per huma teraĵo kaj vokas sian inon. Okazos premiero de la ovometado. La koko fosas irejon al la varma maso kaj ĝi montras tion al la kokino. Fosado de la inejo povas esti unuhora, sed la koko ne povas esti certa, ĉu la kavaĵo taŭgos por la kokino. La kokino venas, inspektas kaj returnas sin ofendita al la arbareto. La proceduro ripetiĝas tri- aŭ kvarfoje antaŭ la aprobo de la ino. Post la metado de ovo la kokino malaperas, sed revenos post unu semajno por ree meti ovon. Dum la semajno kaj dum la tuta elkova tempo la koko havas kolosan laboron por teni ekzaktan varmon, 33° C, en sia elkova maŝino. Diferenco de unu pli aŭ malpli gradoj estos fatala. Frumatene la koko fosas sin malsupren, konstruas kanalojn por ventolado. Kompoŝta varmo, kio estis necesa nokte devas esti forigita tage. Vespere la koko fermas tiujn kanalojn.

Kiam somera varmo pligrandiĝas, ne sufiĉas nur la ventoliloj, sed la koko devas uzi alian manieron por malvarmetigi sian stakon. Ĝi faras tion per sablotavolo, kiun ĝi pligrandigas laŭ la bezono. Dum la mezosomero la dikeco de tiu sablotavolo povas esti unumetra. Jam ĝis nun ĝi uzis dudek kubikmetrojn da sablo, kiun tiu sola birdo devas kolekti kaj treni nur per siaj piedoj. La tuta konstruaĵo atingas ĝis nun unumetran altecon kaj kvin metrojn diametre. Sed pli kaj pli da laboro atendas nian kokon. Dum la plej varmegaj somertagoj ne sufiĉas simpla krudlaboro. La koko estas devigita uzi rafinitan teknikon. Ĝi devas

konstrui fridigilon en la ovejo. Frue en mateno kiam aero estas malvarmeta, ĝi disternas sablon proksime de la stako por malvarmigi ĝin. Tiun sablon la koko poste trenas tra la irejon en la ovejon. Ĉiu mateno ĝi ree fosas la sablon, malvarmetigas kaj retransportas, kaj ĉiufoje precizan bezonatan kvanton kompare al sunvarmo de tiu tago. La meteologia situacio estas enprogramita en ĝia cerbo.

Proksimiĝas aŭtuno kaj la megapoda koko ekhavas novan problemon por solvi. Suna varmo kaj varmo de la kompoŝto malpliĝas. Kiamaniere do agas la birdo, kiu neniam studis fizikon en lernejo? Jes — ĉiumatene kiam suno jam varmas, ĝi forŝutas sablon kaj kompoŝton tiom multe, ke nur kelkaj centimetroj kovras la ovojn. La nesto nun similas al supotelero kaj tiamaniere la koko uzas sunbrilon maksimume. Sed tagon sekvas nokto. Aŭtunaj noktoj en suda Aŭstralio estas malvarmaj. Pro tio estas bezonata hejtigilo. Ĉiutage la koko sternas amason da sablo kaj varmigas tion en tagmeza sunvarmo. Vespere ĝi remetas sablon kiel korvilon sur la grandan fosaĵon. La vetero estu kia ajn, la temperaturo en la ovejo necesas esti 33° C. Ĉiun duan minuton la koko kontrolas temperaturon per sia beko. En sia lango aŭ en la palato ĝi havas ege precizan mezurilon, laŭ kiu ĝi povas agi. Meze en tiu laboro, en la plej bona okazo eloviĝas unu ido ĉiusemajne.



Ilustraĵo: Aira Kankkunen.

Ĉar la gepatroj estas tro okupitaj je sablo aŭ ovumado, la ido devas mem eliri el la stako. Tragrimpi unumetran tavolon, kompoŝtan kaj sablan, estas dudekhora laboro por la ido. Kiel la plej soleca ido en la mondo ĝi tuj eniras en arbustaron sen ia ajn prizorgo de la gepatroj. Ĝi evoluas rapide; jam je la unua vespero ĝi povas flugi. Soleco sekvas vivon de

mallee-kokido. Sed kiam ĝi estas plenkreska kaj venos la tempo de kovado, ĝi konstruas kaj prizorgas sian komplikan neston same lerte kiel sia patro faris, kvankam ĝi neniam vidis ĝin.

Do, mia sinjoro, kiam ĉiutagaj taskoj surpezas vian bruston, pensu pri megapodoj!

## Nordia kunlaboro inter esperantistoj dum la 2-a Mondmilito

de Soile Lingman

Mia patro estis esperantisto en Turku, Finnlando, jam komence de la 30-aj jaroj. Li korespondis kun esperantistoj en Svedio, Norvegio kaj Germanio.

Kiam la vintra milito komenciĝis aŭtune 1939 mia fratino kaj mi estis 7 kaj 3 jaraĝaj.

En januaro 1940 mia fratino Orvokki estis sendita kiel militinfano al Norvegio. La esperantofamilio de Arno Hallgren bonkore invitis ŝin loĝi ĉe ili en Drammen. Tamen, jam en marto 1940 la germanoj invadis Norvegon kaj la finnaj infanoj devis rapide reveni hejmen al Finnlando. Mia fratino havis bonajn memorojn pri tiu mallonga restado en esperantista familio.



*Mia patro Arthur.*



*La fratinoj Soile 2-jara kaj Orvokki 6-jara kune kun sia patrino Katri en Turku/Åbo. La lasta antaŭ-milita foto, farita de mia patro.*

En junio 1941 ni ambaŭ fratinoj estis sendataj kiel militinfanoj al Svedio. Ni estis du inter 70.000 finnaj militinfanoj en Svedio. Ni loĝis 5 jarojn ĉe kamparanaj familioj en Halland. Aŭtune 1946 ni revenis al nia familio en Finnlando forgesinte la finnan lingvon. Tiam mi estis 10-jara kaj fratino 14. Por mi oni trovis lokon en svedlingva lernejo.

Mia fratino devis pasigi du jarojn en finningva faklernejo ĉar dum la unua jaro ŝi ne komprenis la finnan lingvon.

Somere 1949 mi estis invitita gasti ĉe mia militempa familio en Halland. Mi flugis de



Turku al Stokholmo kie esperantofamilio de Kurt Bergcrantz akceptis min kaj kondukis min al la stacidomo la sekvan tagon. En Gotenburgo min akceptis alia esperantoamiko de mia patro, Oskar Svantesson. Li helpis min ŝanĝi la trajnon en Gotenburgo. Feliĉe mi atingis Varberg kaj saltis el la trajno en lasta minuto. Tie min akceptis filo de mia gastfamilio.

Mi pasigis la someron en tiu familio kaj revenis hejmen aŭtune por daŭrigi mian lernejon.

Tiam mia fratino jam loĝis en Gotenburgo kaj laboris en instruista familio. Ili estis kolegoj de Oskar Svantesson, korespondamiko de nia patro.

En januaro 1951 mi kune kun miaj gepatroj translokiĝis de Finnlando al Älvängen, norde de Gotenburgo en okcidenta Svedio. Tie ni ricevis laboron kaj loĝejon.

Somere 1952 mi biciklis kun mia patro al Drammen en Norvegio por viziti la familion de Arno Hallgren. Ankaŭ lia frato Dagfinn estis esperantisto. Dum tuta semajno mi aŭdis ilin paroli Esperanton kaj mi nenion komprenis. Tiam mi decidis eklerni esperanton, kaj tion mi neniam pentis.

Mi povas aldoni ke mi en jaro 1959 vizitis la germanan familion Vogel. Ili estis



*Festo de la naskiĝtago de Soile kiam ŝi estis zorginfano en Svedio.*

korespondamikoj de mia patro komence de la 30-aj jaroj. Nur la patrino Linda kaj filo Harald loĝis en la tute ruinigita urbo Dresden. La patro malaperis en la mondmilito. Dum la sekvaj jardekoj mi ne havis kontakton kun la familio Vogel. Sed antaŭ kvin jaroj, post la UK en Nitra, mi denove vizitis ilin en Dresden. Mi estis gastigita de Harald Vogel kaj lia edzino. Ili tre bone regalis min kaj por mi estis granda ĝojo ekvidi kiel belan malnovan urbon oni rekonstruis en Dresden.

Mi spertis bonkoran kaj amikan akcepton de ĉiuj esperantofamilioj, korespondamikoj de mia patro.

Estis vere valora donaco, la lingvo Esperanto, kiun mi ricevis de mia kara patro Arthur.

## Memma – finsk påskdessert

Memma (på finska Mämmi) har en lång historia i finländsk matlagning och förekom hos värmlandsfinnar. Rätten har på senare år även fått vidare spridning i Sverige.

Memma var ursprungligen en folklig rätt i Finland som inte åts i högreståndskretsar. Senast under 1600-talet började den finskspråkiga befolkningen i sydvästra Finland göra en festmemma till påsken. Den skiljde sig



*Memma serverad med strösocker och kaffegrädde.*

från den vardagliga memman genom att den innehöll maltmjöl och gräddades i ugn i näverrivor. Under 1800-talets lopp blev memman mycket populär bland borgerskapet och äts under hela våren ända fram till midsommaren vid festliga tillfällen.

På 1950-talet blev memman något som så gott som alla i hela Finland kände till. I det efterkrigstida Finland behövde man nationalsymboler och memman var så speciell, både till utseende och till smak, att den lämpade sig väl som nationalrätt. Memmarecept hade också tagits med i kokböckerna och lärdes ut i husmodersskolorna, dock med en något förenklad tillverkningsprocedur.

### Utseende och tillverkning

Memma är huvudsakligen gjord på rågmjöl, rågmalt och sirap. Rätten har en mycket

karakteristisk klibbig konsistens och mörkbrun färg med mustig, söt doft av spannmål. Memma äts vanligtvis med grädde, mjölk eller kaffe-grädde, och ofta med strösocker. En modern variant är att servera memma med vaniljglass.

Traditionellt var det en lång procedur att laga memma. Det tog över ett dygn, för den skulle ömsom hållas ljum, ömsom vispas kraftigt och länge med bunken stående ute i snön, för att till slut baddas i timmar i ugnen.

Memman förvarades förr i näveraskar, rivor, men de har numera ersatts av pappaskar. Den färdiga memman måste förvaras kylt; ofta fryses memman före distribution till butik. En känd tillverkare är Kymppi-Mämmi i Toijala i Birkaland, Finland. I Sverige tillverkar och distribuerar Fazer Bageri stora delar av säsongproduktionen av memma.

## Pri kalorioj

– Ĉu vi scias kio estas kalorioj?

– Jes, preskaŭ... sed la vorto ne estas tute klara por mi. Bv. klarigi!

– Ili estas malgrandaj fibestoj, kiuj kaŝiras nokte kaj rekudras la vestojn tiel ke tiuj malgrandiĝas. /Siv



## Laponia pentristo Reidar Särestöniemi

de Saliko (Raita Pyhälä)



Reidar naskiĝis en Kittilä, norde de la Arkta cirklo en 1925 kiel la lasta el sep gefiloj de la gepatroj. Li kreskis en izolita vilaĝo, kie la norda naturo kaj la malnovaj fabeloj forte impresis lin. En la fabeloj oni kredigis, ke kiu ajn povas ŝanĝiĝi en beston, vivi bestan vivon kaj reveni al sia homa korpo poste. Reidar eksentis, ke kelkaj bestoj estas liaj fratoj.

La birdo lagopo simbolis lian animon, liajn sentivecajn timojn. Vintre tiu birdo ŝirmiĝas per blanka plumaro kaj kovras sin per

neĝo por elteni la froston. La linko estis lia frato. Linkoj kaj li kune estis kuraĝaj kaj fortaj.

Plie li imagis sin kiel Capella gallinago (svede enkelbeckasin, Esperante galinago) kaj en unu pentraĵo lia oni vidas lin, kun kornoj, flugi kun la galinago alte en la ĉielo (vidu bildon sube dekstre).



Li mem priskribas siajn pentraĵojn kiel esprimojn de liaj sopirado, idealoj, zorgoj, problemoj, timoj, ĝojoj kaj deziroj. "Mi faras tiujn ĉi bildojn kaj esperas, ke ili ion donos al la homoj," li diris.



*Donacoj de baptoĝepatroj: Maldekstre portebla "komsio" en kiu nomadaj sameoj portis siajn bebojn.*

naturon, precipe ĉirkaŭ si. Li sukcesis nuligi la planojn konstrui digojn en la riveron Ounasjoki, kiu fluas en lia najbareco. La riveron oni ekprotektis en la jaro 1983, du jarojn post la morto de Reidar.

*Linkofratoj. Oni supozas ke li esprimas sian kaŝitan seksan sopiron.*



*Mempotreto.*

Reidar (prononco rejdar) studis arton en la Akademio de Finnlando kaj en la Akademio de Peterburgo, en la Instituto Ilja Repin. Post la studjaroj li reiris al sia lapona izolita hejmo kaj konstruis atelieron apud ĝi. Li volis protekti la



La ateliero kaj muzeo de Reidar Särestöniemi daŭre estas viziteblaj tra la jaro, se nur vojoj tien estas uzablaj kaj la vetero permesas.

La artomuzeo Didrichsen en Helsinki/Helsingfors aranĝis grandan ekspozicion de liaj verkoj 8.2. – 1.6.2025 omaĝe de la centa datreveno de lia naskiĝo. La ekspozicio montriĝas granda sukceso. La

vico de vizitemuloj ofte longas. Atendante sian vicon oni tie povas admiri ankaŭ la maron, la rokan bordon kaj pinojn sur la bordo. Tial la etoso en la vico estas bona kaj trankvila.



*Antaŭ la muzeo Didrichsen Reidar faris la afiŝon siatempe. Oni nur ŝanĝas la datojn laŭbezone.*

*La picearo de la alkoj.*

## Bonan matenon! – God morgon!

*En Göteborgs-Posten 11 aprilo:*

En Kortedala, la savservoj devis respondi al iomete aparta misio. Estis papago, kiu estis fiksita en arbo. Sed kiam la savservoj provis liberigi ĝin, la papago kriis (en la angla) "fiku vin". Sed la fajrobrigado restis trankvila. La posedanto de la papago tiam devis pendii en la korbo de la gruo kaj logi ĝin per pako da cigaredoj. Jes. Cigaredoj.



*I Göteborgs-Posten 11 april:*

I Kortedala fick räddningstjänsten rycka ut på ett lite annorlunda uppdrag. Det var en papegoja som hade fastnat i ett träd. Men när räddningstjänsten försökte få ner den skrek papegojan "fuck you". Men räddningstjänsten tog det med ro. Papegojans ägare fick då hänga med upp i lyftkranens korg och locka den med ett paket cigaretter. Ja. Cigaretter.

La vera bildo de la savo de la papago.

Ofte gazeto volas havi bildon kune kun artikolo. La saman deziron havas Ora Ĵurnalo. Eble oni ne trovas la veran bildon, sed enmetas alian. Serioza gazeto tamen ne volas trompi la legantaron kaj skribas "Ĉi tiu bildo ne kongruas kun la artikolo". Mi faras la samon: Ĉi tiu papago havas nenion rilaton al la artikolo. (Do oni ne ofendas la veran papagon.) /Siv



# Al konata pentristo

de Tatyana Auderskaja, Odessa

Pentristo apud fenestro,  
Pentrestro apud montrilo  
Rigardas per longa rigardo  
Al Primorskij bulvardo

Kaj vidas arbedojn florajn,  
Teatrajn kupolojn glorajn,  
Blankantajn ŝipojn en maro,  
Grizplatojn de la ŝtuparo,  
Kaj super ĉio, senlima,  
Penetris lian animon  
Klara ĉiela blueco –  
Amika mesaĝ' de Odeso.

Magistro kaj grandmajstro,  
L'Pentristo, de la fenestro  
Foriras al pentrostablo  
Kaj el tuta sia kapablo  
Komencas pentri portreton  
De sia propra persono,  
Ĉar sole ĝin li ne vidis  
En ĉirkaŭanta mondo.

**Tatjana Auderskaja**



## Alingsås, amuza urbo!

Alingsås havas vastan areon, kiu enhavas kaj malgrandajn lignajn dometojn kaj grandajn pluretaĝajn domegojn, sed ĉie oni havas la naturon en promenadistanco.

Iam estis esperanta klubo en Alingsås, sed nun oni ne vidas spuron de la klubo. Antaŭ kelkaj jaroj la altano de Sten estis plena je gotenburgaj esperantistoj. Aino troviĝas sur

*Tri esperantistoj: Jan el norda Noltorp, mi el suda Noltorp kaj Sten el Kvarnabo, almenaŭ somere, ĉar tie li havas somerdometon.*



pluraj fotoj. Tiam Sten ankoraŭ ne havis sian lageton. Nun ĝi estas preta, post multe da laboro de Sten, kaj plenas de bestetoj, i.a. salamandroj, kiuj venis al la lageto sen helpo de Sten.



Post Kvarnabo ni daŭrigis al Sollebrunn, alia parto de Alingsås. La malnova benzinservostacio iam estis la loko por filmfarado de "Macken".



*Janne kaj Arne deĵoras.*

La benzino kostis nur 99 oerojn litro (dekono de 1 EUR).



Por aero oni devis enmeti unu kronon. Espereble la aero sufiĉis por la kvar pneŭoj.



Sufiĉe proksime al la centro de Sollebrunn troviĝas la preĝejo de Erska el la 19a jarcento. Ĝi situas sur monteto sen najbaraj domoj. Emil Viktor Langlet, arkitekto kaj la patro de Valdemar Langlet (vidu numeron 83 de Ora Ĵurnalo) faris la konstrudesegnojn.

La preĝejo havis plurajn antaŭulojn kaj estas bele situanta sur monteto tuj ekster la centro de Sollebrunn kun antikvaj tomboj de la ferepoko kaj la vikinga epoko. En la apuda altaĵo oni vidas tuberojn, kiu per sia formo diras ke en la tero estas malnovaj tomboj.



La urbo Alingsås atentigis la Valpurgan vesperon la 30-a de aprilo. En la muzeoparko aktoris virĥoro, blovorkestro kaj *drillflickor* – knabinoj kun stangetoj, kiujn ili lerte movis. Kaj kompreneble estis salutparolo por la printempo. Ĉar la festo estis en la centro de la urbo oni nek havis fajron nek raketojn. Al mi ili ne mankis.

Mi ne povas ne enmeti bildon de paska sorĉistino, fotita de Jan.

/ Siv



## I Alingsås värnar man om äldre



Träffpunkten är ett populärt ställe, där kommunen erbjuder olika aktiviteter, Den 24e april var det pub-eftermiddag med Håkan Lypert som underhållare. Har du någonsin sett en musikmaskin med skorsten? För mig var det i alla fall en nyhet. Nåja, det visade sig vara en högtalare monterad överst för att ljudet skulle spridas över salen. Mer än 30 pensionärer hade samlats.

Reportoaren var blandad. Håkan sjöng vårvisor, romantiska visor, tuffa amerikanska sånger, Evert Taube och mycket annat och spelade gitarr till musikmaskinen. Det lät som om han hade en orkester bakom sig. Två timmar varade föreställningen.

Jämställdhet också då det gäller trafikmärken i Stadsskogen, den nyaste stadsdelen i Alingsås. Under en utflykt till den stadsdelen fick jag syn på något ovanligt. En kvinna var avbildad på trafikmärket för övergångsställe.



Några meter bort fanns det vanliga märket med en man på.

Nedre bilden: "Gäller förbud att köra bil eller motorcykel till Bredablick" Där har man på skylten målat över ordet Besökande. Alltså: Om du bor i området kan du strunta i förbudsskylten, men alla andra får lämna sina fordon – men var? Någon P-plats såg jag inte.

Medan centrala Alingsås har massor av trähus i två våningar, har Stadsskogen hus så höga som åtta våningar.

/ Siv



# Esperantistoj en la Paraíba-valo, Brazilo



**Paulo Viana** faris la tekston kaj la foton.

Kun granda entuziasmo flanke de pli ol 30 partoprenantoj, okazis en la urbo Lorena, je la 19-a de aprilo 2025, en la brazila ŝtato San Paŭlo, unu plia kunveno de Esperantistoj en la regiono de la Valo de Rivero Paraíba. Ĉi tiu estas vasta regiono situanta inter la ĉefurboj Rio-de-Ĵaneiro kaj San-Paŭlo, longa je pli ol 600 kilometroj, laŭlonge de kiu staras pluraj mezgrandaj urboj, kie aktivas kluboj de parolantoj de la Internacia Lingvo. Pro tio, oni organizas dufoje en ĉiu jaro tiajn kunsidojn, alterne en unu kaj alia ŝtato. Ĉi-foje ĉeestis Esperantistoj el dek urboj. Ankaŭ el la najbara ŝtato Minas Gerais alvenis reprezentantoj.

La programo estis vigla kaj agrabla. Ĝi komenciĝis per prelegeto pri "Toleremo", farita de D-ro Elmir Lima, kiun sekvis aktiva diskuto. Poste oni publike intervjuis la gesamideanojn Cristina Graaf kaj D-ro João Santos pri ilia longa laborado por nia movado, enlande kaj eksterlande. La tria programero konsistis en lanĉo de la plej nova eldonaĵo de EASP: la grava verko de la eminenta brazila aŭtoro Machado de Assis –

"Kinkas Borba", tradukita de Francisco Wechsler al Esperanto.

Post la tagmanĝo, Dirce Sales kaj Paulo S. Viana prezentis parolan originalan legaĵon pri Raymond Schwartz. Sekvis alia intervjuo kun du Esperanto-atletoj, kiuj informas pri Esperanto dum kuradoj, en Brazilo kaj eksterlande: Tania Paixão kaj Walter Fontes. La tria posttagmeza programero estis prelego de Luiz Coelho laŭ la titolo: "Kiel funkcias Sennacieca Asocio Tutmonda?". Poste prelegetis João Otávio Rodrigues pri Brazila Rotaria Esperanto-Klubo kaj Fábio Silva, pri diversaj agadoj por diskonigado de Esperanto en la urbo Pouso Alegre. Fine salutis la reprezentanto de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo kaj de Asocio Esperantis de Rio-de-Ĵaneiro, kiuj dum la tuta evento funkciigis etajn libroservojn.

Dum la tuta evento, estis proponata bongustan senpaga lunĉo al la partoprenantoj, sub la zorgado de Marion Brasil Viana, profesia konfitisto en la urbo Lorena.

(P.S.Viana)



# La lastaj tagoj de L.L. Zamenhof

Ronald Schindler, Berlino, sendis la artikolon, ricevitan de Karl Dietz.

*El ELBB, Fulminformo, 2025-04-14.*

## Mortis L.L. Zamenhof

En la aĝo de 58, ”la 14-an de aprilo la stato de d-ro Z. rapide pliboniĝis; la koro komencis labori pli forte, kaj malaperis la signoj de ĝia akra nesufiĉeco. La kuracistoj havis esperon, ke venos pliboniĝo.

Tiel pensis ankaŭ la mortinto la lastan tagon malgraŭ granda senfortiĝo. D-ro Ludoviko estis en tre bona humoro. Li eĉ rakontis al la ĉirkaŭantaro siajn anekdotajn sonĝojn kaj faris al si esperon, ke post longa interrompo li povos la alvenantan nokton pasigi oportune en sia lito ...

Je la 5-a horo vizitis lin lia konstanta kuracisto kaj amiko d-ro K. kaj konstatis ĉe li efektivan

pliboniĝon. Post duonhora amika interparolo, sentante sin iom laca, mia frato petis la permeson de d-ro K, iom ripozi sur divano.

– Ĝi estis lia lasta memvola movo!

Kiam lia edzino alproksimiĝis, por prepari al li oportunan kuŝejon, ŝi jam trovis sian edzon malviva!”

(El La Lastaj Tagoj de Dro L. L. Zamenhof)



## El Ĉio estas tie Ur Allting finns

Eltiraĵo el ”Allting finns” (Ĉio estas tie/Ĉio ekzistas) de Göran Grip. De Roger Nilsson kun permeso de la aŭtoro.

*Utdrag ur ”Allting Finns” av Göran Grip. Av Roger Nilsson med tillstånd av författaren.*

En rakonto de multaj miloj da jaroj, Dio kreis Adamon kaj Evan. Li metis ilin en mirindan ĝardenon, kie ili havis ĉion, kion ili bezonis. Estus tute bone, se la rakonto estus fininta tie.


Sed en ĉi tiu rakonto, Dio diris al Adamo:

- Ĉio ĉi estas via.
- Ĉu ĉio? miris Adamo.
- Jes, preskaŭ ĉio. Ĉu vi vidas tiun arbon?
- Kiu do?

I en mĉnga tuzen ĉr gammel berĉttelse skapade Gud Adam och Eva. Han placerade dem i en underbar trĉdgĉrd dĉr de hade allt de behĉvde. Det hade varit gott och vĉl om berĉttelsen hade slutat dĉr.

Men i den hĉr berĉttelsen sa Gud till Adam:

- Allt det hĉr ĉr ditt.
- Alltsammans? Undrade Adam
- Ja, nĉstan alltsammans. Ser du det dĉr trĉdet?



– Tie. Tiun grandan arbon, kiun mi plantis meze de la ĝardeno.

– Ho, tiu arbo!

“Vi ne devas tuŝi tiun arbon,” diris Dio. Ĉar tiam vi mortos. Ĉi tio estis la unua mesaĝo de Dio al homo kaj ĝi estis mensogo. Estis Dio, kiu enkondukis la mensogon en la mondon de homoj.

La serpento diris al Eva ke ili ne mortos pro manĝado de fruktoj de la arbo de scio, sed ke ili fariĝos kiel Dio. Estis la serpento, kiu enkondukis la veron en la mondon de homoj.

Adamo kaj Eva manĝis la fruktojn de la arbo. Ili ne mortis. Ili certe ĉirkaŭrigardis surprizite. La unuan fojon ili vidis la mondon kaj unu la alian. Kaj ili vidis Dion. “Kial li mensogis al ni?”

Ne estas malfacile kompreni, kial ili kuris kaj kaŝis sin de li la venontan fojon kiam ili aŭdis lin vagi en la ĝardeno.

Dio alproksimiĝis al ili kaj diris:

– Kion? Ĉu vi estis malobeema, Adamo?

Ĉi tio estis la unua ago de Dio al Adamo. Ĝi estis akuzo. Estis Dio, kiu enkondukis pekon en la mondon de homoj.

“Ne estis mia kulpo”, Adamo diris. Mi faris nenion. Ĉio estis ŝia kulpo.

Estis Dio, kiu provokis la perfidon en la mondo de homoj.

Poste li turnis sin al Eva:

– Kion vi faris!

– Ankaŭ ne estis mia kulpo, diris Eva. Mi ne povis eviti ĝin. Estis la serpento kiu trompis min.

En la estonteco, Eva disprenos la kapon de la serpento kaj la serpento mordis ŝin en la kalkanon. En sia tria akto, Dio enkondukis malamon kaj venĝemon en la mondon de homoj.

Tiam li punis ilin. Li komencis kun Eva. Ŝia gravedeco estu malfacila kaj la naskiĝo dolora: li difinis la doloron kiel punon. Ŝi deziru sian edzon: li difinis ŝian deziron kiel punon. Ŝi

– Vilket då?

– Där borta. Det där stora trädet som jag planterat mitt i trädgården.

– Åh, det där trädet!

– Det trädet får du inte röra, sa Gud. För då ska du dö.

Detta var Guds första besked till människan och det var en lögn. Det var Gud som införde lögnen i människornas värld.

Ormen berättade för Eva att de inte skulle dö av att äta frukter från kunskapens träd utan att de skulle bli lika Gud. Det var ormen som införde sanningen i människornas värld.

Adam och Eva åt av trädets frukter. De dog inte. Hjälpna måste de ha sett sig om. För första gången såg de världen och varandra. Och de såg Gud. “Varför ljög han för oss?”

Det är inte svårt att förstå varför de sprang och gömde sig för honom nästa gång de hörde honom komma vandrande i trädgården.

Gud gick fram till dem och sa:

– Vafalls? Har du varit olydig Adam?

Detta var Guds första handling mot Adam. Det var en anklagelse. Det var Gud som införde synden i människornas värld.

– Det var inte mitt fel, sa Adam. Jag har inte gjort något. Det var hennes fel alltsammans.

Det var Gud som provocerade fram sveket i människornas värld.

Sen vände han sig till Eva:

– Vad är det du har gjort!

– Det var inte mitt fel heller, sa Eva. Jag kunde inte hjälpa det. Det var ormen som lurade mig.

I fortsättningen skulle Eva krossa ormens huvud och ormen skulle hugga henne i hälen. I sin tredje handling införde Gud hatet och långsintheten i människornas värld.

Därefter bestraffade han dem. Han började med Eva. Hennes graviditet skulle bli svår och förlossningarna smärtsamma: han definierade smärtan som ett straff. Hon skulle åtrå sin man: han definierade hennes åtrå som ett

obeu lin: li difinis obeemon kiel punon kaj tiel potencon kiel ion por strebi.

Tiam Adamo: li malbenis por li la teron kaj kondamnis lin labori kontraŭ ĝi, por ke ĝi nasku lin: li difinis la teron kiel malamikon, kiun oni devas batali kaj la laboron kiel punon. Kaj fine. "Polvo vi estas, kaj al polvo vi revenos": Dio difinis morton kiel punon.

Fine, Dio lamentis, ke homoj fariĝis "kiel unu el ni". Ĵaluze, li forpelis ilin el la Edena ĝardeno.

Kio okazis poste al Adamo kaj Eva, kiam ili ĉirkaŭvagis ekskluditaj el la paradizo, kaj ili ekkomprenis, ke mensogo venas de Dio kaj ke ĉiu, kiu diras la veron, estas malbenita kaj por ĉiam devigita rampi en la polvo? Kiajn pensojn ili havis pri la vero, kiu, la unuan fojon ili renkontis ĝin, estis uzata kun la intenco trompi ilin? Kaj kian rilaton ili havis kun sia ĵus vekita kapablo vidi, kiu, la unuan fojon kiam ili uzis ĝin, kondukis al tiaj teruraj sekvoj por ili?

La Edena ĝardeno estis aranĝita kaptilo. Adamo kaj Eva neniam havis justan ŝancon.



La du fratoj, Kaino kaj Habelo, oferis oferojn al Dio. Dio favoris la oferon de Habelo. Estis Dio, kiu enkondukis maljustecon en la vivojn de homoj.

Kiam Kaino, la pli maljuna frato, ekkoleris, Dio punis lin.

– Kial vi koleras, kaj kial via rigardo estas tiel malhela? Ĉu ne estas tiel: se vi havas bonon en menso, tiam vi kuraĝe rigardas supren, sed se vi ne havas bonon en menso, tiam peko kaŝas sin ĉe la pordo.

Li devigis Kainon silenti pri siaj sentoj riproĉante lin pro ili. Ĉu Dio ne konsciis pri Sia propra parto en la kolero de Kaino? Estis Dio, kiu semis ĵaluzon en la menso de homo.

Kiam Kaino, pro ĵaluzo, mortigis Habelon, Dio malbenis lin. Kaino, profunde rompita pro tio, kion li faris, nekonscia pri la parto de Dio en ĝi, kaj sincere pentanta, faris la malbenon de Dio al sia:

straff. Hon skulle lyda honom: han definierade lydnad som ett straff och därmed makt som eftersträvansvärd.

Sen Adam: han förbannade marken för honom och dömde honom att arbeta mot den för att den skulle föda honom: han definierade jorden som en fiende som måste bekämpas och arbetet som ett straff. Och slutligen. "Du är stoft, och till stoft skall du åter varda": Gud definierade döden som ett straff.

Slutligen beklagade sig Gud över att människorna blivit "som en av oss". Svartsjukt drev han dem ur Edens lustgård.

Vad hände med Adam och Eva efteråt, när de vandrade omkring utestängda från paradiset, och det gick upp för dem att lögnen kommer från Gud och att den som talar sanning blir förbannad och för all framtid tvingas kräla i stoftet? Vad fick de för tankar om sanningen, som för första gången de stötte på den hade använts i avsikt att förleda dem? Och vad fick de för förhållande till sin nyväckta förmåga att se som första gången de använde den ledde till så fruktansvärda konsekvenser för dem?

Edens lustgård var en gillrad fälla. Adam och Eva hade aldrig en ärlig chans.



De båda bröderna, Kain och Abel, offrade åt Gud. Gud favoriserade Abels offer. Det var Gud som införde orättvisan i människornas liv.

När Kain, den äldre brodern, blev vred tog Gud honom i upptuktelse.

– Varför är du vred, och varför är din blick så mörk? Är det inte så: om du har gott i sinnet, då ser du frimodigt upp, men om du inte har gott i sinnet, då lurar synden vid dörren.

Han tvingade Kain att titta om sina känslor samtidigt som han klandrade honom för dem. Var Gud inte medveten om sin egen del i Kains vrede? Det var Gud som utsådde svartsjukan i människans sinne.

När Kain i svartsjuka hade dödat Abel förbannade Gud honom. Kain, djupt förkrossad över vad han gjort, omedveten om

– Mia malbonago estas pli granda ol mi povas elteni. Vi forpelas min de la kamparo, kaj mi devas kaŝi min de vi. Mi fariĝos malstabila kaj pasema ĉi tie sur la tero.

Al tio Kaino en malespero kaj honto aldonis sian propran juĝon sur si: Kaj kiu ajn mortigos min.

Sed Dio opiniis, ke Kaino troigis:

– Ne, tiu kiu mortigos Kainon, estos submetita al sepobla venĝo. Li kondamnis Kainon senvole disvastigi doloron ĉirkaŭ li.



Iun tagon Dio diris al Abrahamo:

– Ĉu vi timas min, Abrahamo?

– Jes, kompreneble mi faras tion.

– Tiam vi devos pruvi tion. Oferu vian amatan filon Isaak kiel bruloferon al mi, kaj mi kredos vin.

Kiam Abrahamo ligis sian filon al la ŝtiparo kaj levis la buĉan tranĉilon, Dio denove fortiris la grundon de sub la piedoj de Abrahamo:

– Ho, Abrahamo. Haltu. Mi nur volis testi vin. Nun mi scias, ke vi timas min. Vi ne devas oferi Isaak, vian solan filon. Mi elektas ĉi tiun virŝafon kiel viktimon anstataŭe.

Blinda al la ofendo de Dio kaj en konfuzita dankemo, Abrahamo nomis la lokon "la Eternulo elektos".

Kiam Abrahamo trapasis la provon kaj mortigis la emociojn, kiuj servas al la vivo, Dio rekompencis lin per ekstera, monda sukceso: liaj idoj fariĝus sennombraj, grandaj kaj konkerus la urbojn de siaj malamikoj, kaj ĉiuj aliaj popoloj dezirus la saman feliĉon.

Dio kreis la unuan okcidentanon.



Kio eble okazis interne de la knabo Isaak en tiu momento de morta angoro, kiam la tranĉilo estis levita kaj li sciis, ke lia patro tranĉos lian gorĝon? Kaj kio okazis en la sekva momento de neatendita liberigo?

Kion vi spertas dum mortangoro estas bruligita en vian menson por eterneco – ĝis la

Guds del i det och oppriktigt botfærdig, gjorde Guds forbannelse till sin egen:

– Min missgærning er større en jeg kan bære den. Du driver bort mig ifrån åkerjorden, og jeg måste gömma mig för dig. Jag kommer att bli ostadig och flyktig här på jorden.

Till detta lade Kain i förtvivlan och skam sin egen dom över sig själv: Och vem som helst kommer att dräpa mig.

Men då tyckte Gud att Kain gick för långt;

– Nej, den som dräper Kain kommer att bli utsatt för en sjufaldig hämnd. Han dömde Kain till att ofrivilligt sprida smärta omkring sig.



En dag sa Gud till Abraham:

– Fruktar du mig, Abraham?

– Ja, det är väl klart att jag gör.

– Då får du allt bevisa det. Offra din älskade son Isak som brännoffer åt mig så ska jag tro dig.

När Abraham bundit sin son vid bålet och höjt slaktkniven ryckte Gud än en gång undan marken under Abrahams fötter:

– Äsch Abraham. Sluta. Jag ville bara testa dig. Nu vet jag att du fruktar mig. Du behöver inte offra Isak, din ende son. Jag utser den här väduren till offer istället.

Blind för Guds kränkning och i förvirrad tacksamhet kallade Abraham platsen för "herren utser."

När Abraham så bestått provet och dödat de känslor som står i livets tjänst belönade Gud honom med yttre, världslig framgång: hans avkomma skulle bli oräknelig, stor och skulle erövra sina fienders städer, och alla andra folk skulle önska sig samma lycka.

Gud hade skapat den förste västerlänningen.



Vad kan ha utspelat sig inom gossen Isak i det ögonblick av dödsångest då kniven var höjd och han visste att hans far skulle skära halsen av honom? Och vad hände i nästa ögonblick av oväntad befrielse?

tria kaj kvara generacio. Isaak, prapatro de sennombraj popoloj, lernis bridi sian naturan volon por defendi sin kaj pasive kaj submetiĝeme esperi, ke la murdo ne okazos.

Dio kreis la duan okcidentulon kaj la unuan neŭrozulon.



Mi neniam forgesos mian surprizon, jes, la kapturnigan miron, kiun mi sentis, kiam mi malkovris, ke la unua mesaĝo de Dio al la homaro estis mensogo, ke tiu, kiu estis nomita Dio, mensogis al homoj, kaj ke tio, kion la serpento efektive faris, estas paroli la veron. Kiel mi povus eviti tiom longe malkovri ion, kio estis tiel evidenta, kiam oni malfermis la okulojn al ĝi? Kiel mi kaj tiom da homoj povis ne rimarki, ke Dio mensogas?

Kiel estas la estaĵo nomata Dio en ĉi tiuj miljaraj rakontoj? Kian opinion li havas pri si mem, tiu, kiu atakas la vidon, scivolemon, fidon, seksan deziron, laborĝojon, koleron, ĵaluzon, korpan doloron, la ĝojon de obeo, la respondecon de regado, sindonemon, morton, resume: tio, kio estas natura kaj kiu estas en la servo de la vivo kaj kion homoj bezonas por vivi honeste, nature kaj neneŭroze? Kio instigas lin starigi malpermesojn, allogi homojn rompi la malpermesojn, kaj poste ilin kruele kaj senkompate puni, semante en ilia menso honton kaj kulpon? Kio igas lin nekapabla toleri, ke ili fariĝu kiel li mem en la konscio? Kio pelas lin fari tian ĥaoson inter tiuj, super kiuj li havas potencon?

Tiu, kiu nomiĝas Dio, ne konis la amon de Abrahamo, li estis malsentema al la interna, reala fluo inter vivantaj estaĵoj, li estis surda kaj blinda al la spirita mondo. Li postulis eksteran, palpeblan pruvon por tio, kio neniam povas esti pruvita, kiu neniam devas esti pruvita, sed kiu povas esti facile kaj ame montrita al iu ajn, kiu povas vidi.

Kaj en foresto de amo, li prenis ĉion, kion li povis akiri en la manojn: potenco, respekto, admiro, timo, submetiĝo – la falsaĵoj de amo.

Tiu, kiu en ĉi tiuj rakontoj estas nomata Dio, bezonus lerni pri amo. Li bezonus repaciĝi kun si mem kaj bezonus liberigi sin de ĉiuj

Det man upplever under dödsångest bränns in i ens sinne för evärdelig tid – intill tredje och fjärde led. Isak, förfader till oräkneliga folk, lärde sig att lägga band på sin naturliga försvarsvilja och att passivt och undergivet hoppas att mordet inte ska bli av.

Gud hade skapat den andre västerlänningen och den förste neurotikern.



Jag kommer aldrig glömma min förvåning, ja, den svindlande häpnad jag kände när jag upptäckte att Guds första besked till mänskligheten var en lögn, att den som kallades för Gud ljög för människorna, och att vad ormen i själva verket gjorde var att tala sanning. Hur kunde jag under så lång tid ha undgått att upptäcka något som var så tydligt när man väl fått upp ögonen för det? Hur kunde jag och så många människor ha undgått att lägga märke till att Gud ljög?

Hurudan är den varelse som i dessa mångtusenåriga berättelser kallas för Gud? Vad har han för syn på sig själv, han som angriper seendet, nyfikenheten, tilliten, den sexuella lusten, arbetsglädjen, vreden, svartsjukan, den fysiska smärtan, glädjen i att lyda, ansvaret i att härska, hängivenheten, döden, kort sagt: sådan som är naturligt och som står i livets tjänst och som människor behöver för att leva ärligt, naturligt och oneurotiskt? Vad är det som driver honom att ställa upp förbud, locka människorna att bryta mot förbuden och därefter grymt och obarmhärtigt straffa dem och utså skam och skuld i deras sinne? Vad är det som gör att han inte tål att de blir lika honom själv i medvetenhet? Vad är det som får honom att ställa till en sådan förödelse bland dem han har makt över?

Den som kallas för Gud kände inte Abrahams kärlek, han var okänslig för det inre, verkliga flödet mellan levande varelser, han var döv och blind för den andliga världen. Han krävde yttre, handfasta bevis för det som aldrig någonsin låter sig bevisas, som aldrig behöver bevisas, men som lätt och kärleksfullt kan visas för vem som helst som kan se.

konfuzaj, nenaturaj emocioj, kiujn li tiel energie transdonas al sia popolo. Li bezonus esti amata kaj lerni ami sin mem. Ĉar nur amo povas sanigi tiujn, kiuj neniam estis amataj.



**La libro (eldonita 1994) estas tre bona. Rekomendinda. La aŭtoro estas anesteziisto kaj la libro i.a. temas pri vivkonceptoj, etikaj demandoj kaj pri lia propra vivo kaj elkresko. – Roger**

**Kommentar:** Jag läste för ett antal år sedan också *Allting finns* av Göran Grip. Författaren är en sanningsökare, som inte nöjer sig med blind tro på en gud som fått alltför många dåliga mänskliga drag.

Jesus sa att han skulle skicka "Den helige ande" för att upplysa människorna om sanningen. Kanske menade han alla de

Och i brist på kärlek tog han vad han kunde komma över: makt, vördnad, beundran, skräck, underkastelse – kärlekens falskmynt.

Han som i dessa berättelser kallas för Gud skulle behöva lära känna kärleken. Han skulle behöva försonas med sig själv och skulle behöva befria sig från alla de förvirrade, onaturliga känslor som han med sådan energi överför på sina människor. Han skulle behöva bli älskad och lära sig älska sig själv. Ty det är bara kärleken som kan hela den som aldrig blivit älskad.

**Boken (tryckt 1994) är mycket bra. Kan rekommenderas. Göran Grip är narkosläkare i Malmö och boken handlar mycket om livsåskådning och om hans eget liv och uppväxt. – Roger**

sanningsökare som under tiderna sökt lösa livsmysteriet.

Många klarar inte en förmänskligad Gud. Bättre se människan som gudomlig – eller i varje fall på väg mot gudomlighet genom många liv - än att se Gud förmänskligad!

/ Siv Burell

## La porka milito

Video, sendita de **Lottie Ericson**, Kanado



<https://www.youtube.com/watch?v=s1ax5awDyAY&pp=0gcJCdgAo7VqN5tD>

### Kiam porko preskaŭ kaŭzis militon

Ĉu porko povas kaŭzi internacian konflikton? En 1859 tio preskaŭ okazis! Aŭskultu kiel usonano mortigis britan porkon, soldatoj preskaŭ ekbatalis, kaj kiel jarcenton poste, bonhumora ceremonio finiĝis per alia porka tragedio – ĉi-foje ĉe esperantista doganisto!

La porka milito okazis en la insulo San Juan inter Usono kaj Brita Kanado en 1850. Brita loĝanto sur la insulo San Juan posedis porkon.

La porko hazarde eniris ĝardenon de usona farmisto kaj manĝis liajn terpomojn.

La farmisto, kolera pro la invado al sia ĝardeno, pafmortis la beston.

Kompreneble la brita posedanto koleriĝis, kaj baldaŭ la eta konflikto fariĝis granda diplomata problemo.

Ambaŭ flankoj sendis trupojn al San Juan kaj la malpaco kreskis rapide.

Usonaj kaj britaj soldatoj alfrontis unu la alian, sed ambaŭ nacioj volus eviti

sangoverŝon. Anstataŭ ol batali, ili decidis paceme kunlabori.

**La reala historio finiĝas tie, sed se vi klakas al la ligilo supre, vi povas aŭskulti/legi la komentojn, kiuj aludas la nunan mondsituacion! /Siv**



## Adiaŭ al Orm la Ruĝa!

### Kaj bonvenon nova libro!

Antaŭ ol ni finlegis Orm la Ruĝa en la Librorondo, ni lasis al ĉiuj, mem ekscii, kiel Orm finfine revenis al sia gepatra bieno.

La legantoj havis diversajn opiniojn pri la enhavo: Tro malfacila, tro da novaj vortoj, tro longdaŭra kun nur po du ĉapitroj por monato, pli bone legi po unu libro monate, tre lerniga pri la vikinga epoko, tre interese ke la vikingoj spertis tri religiojn post la iama kredo je Tor: la judismo, la islamismo kaj la kristanismo.

Pliaj opinioj: Forta sento por justeco (ekz: dekapigu nin en vico, ne preterpasu min por unue mortigi nian estron!), la libro ne taŭgas por diskutado, la libro ja plenas je kruelaj agoj, sed homoj ankaŭ hodiaŭ ŝatas legi krimromanojn kun multe da kueleco. Orm la Ruĝa enhavas multe da humuro, tamen ofte "gajhumuro de pendigoto".


Pri la pli fruaj librorondaj libroj – Sesdek ok, Sur bluaj planedoj, La strato de Tanja kaj La kurioza incidento de la hundo en la nokto kreis – se ne samopiniojn – tamen bonajn diskutojn.

Rilatoj inter homoj ĉiam estas interesa afero. Ni ja jam legis Sesdek ok verkita de Sten

Johansson. Liaj du libroj pri Marina donas multajn ideojn pri sociaj rĵlatoj. Bona elekto estus ankaŭ lia libro Falaflo en maco de 2023 pri la influo de la konflikto inter Palestino kaj Israelo. La israela Filippa kaj la araba Kasim ambaŭ loĝas en Svedio.

**Sed – prefereble ni ne elektu pli ol unu libron de la sama verkisto.**

Nun la proponoj de Rianne en Nederlando pri nova libro estas la jenaj: **Anna de verdaj gabloj**, **Kredu min sinjorino** kaj **El verva vivo ĵurnalista**. – Ĉu vi havas aliajn proponojn?



**Bonvolu alliĝi jam nun al la sekva librorondo, kiu komenciĝos en aŭgusto. Laŭ mi oni bezonas duonjaron por tralegi kaj diskuti novan libron. La plej rapidaj legantoj eble povus fondi propran grupon.**

**/ siv.burell@gmail.com**

# Orm la ruĝa kaj liaj egaluloj – Röde Orm och hans gelikar

de Ingegerd Granat

Dum la pasinta studsezono, kuraĝa grupeto legis "Orm la Ruĝa" en la Libra Rondo, rete kaj kune. Kelkaj forfalis jam de la komenco, poste malaperis unu post la alia. La lastan fojon, ĉi tiun aprilon, ni adiaŭis la vikingan Orm kaj liajn kunulojn. Ni trairis proksimume duonon de la libro kaj ĉiu rajtas legi ĝin memstare.



Estis skribita en la gotenburga gazeto GP la 2-an de marto 2025, ke la Universitato de Gotenburgo havis odontologiajn radiologojn en la universitato kaj arkeologo de la Vestrogotia Muzeo ekzamenas dek kvin vikingajn kraniojn.

Ni, kiuj partoprenis kaj sekvis la herooĵojn de Orm, alvenis al la samaj konkludoj kiel ĉi tiuj specialistoj. Ne estas mirinde, ke ili suferis de ĉiuj ajnaj infektoj kiel dentodoloro, orelinfekto kaj sinusito, kaj fine la esploristoj trovis, ke ankaŭ la vikingoj suferis de artrozo. Por multaj el ili, la vivo estis mallonga kaj malsana. Ne ekzistis kuracistoj aŭ penicilino tiam.

Ni, kiuj legis la libron, opinias ke ni vidis, ke la vikingoj vivis nesanan kaj vundeblan vivon. Ili sidis tie sur siaj ŝipoj kaj frostiĝis en ŝtormoj, ili ricevis vundojn kaj lezojn en bataloj kontraŭ malamikoj, ili manĝis manĝaĵon kiuj estis malnova kaj kun vermoj, kaj ili remis kaj remis, nesurprize iliaj artikoj estis eluzitaj.

Under den gångna terminen har en tapper liten skara läst "Röde Orm" i Libra Rondo på nätet och tillsammans. Några föll bort redan från början, sedan försvann en efter en. Sista gången, nu i april, tog vi adjö av vikingen Orm och hans medfarare. Vi kom ungefär till hälften av boken och det står ju var och en fritt att läsa ut på egen hand.

Det har skrivits i GP den 2/3 2025 att man på Göteborgs universitet låtit odontologiska radiologer på universitetet och en arkeolog på Västergötlands museum undersöka femton vikinga-skallar.

Vi som deltagit och följt Orms bravader har kommit till samma slutsatser som dessa specialister gjort. Inte så konstigt att de led av alla möjliga infektioner såsom tandinflammationer, öroninflammationer och bihålainflammationer och till slut fann forskarna att vikingarna även led av artros. För många av dem blev det ett kort och sjukt liv. Det fanns ju varken läkare eller penicillin då.

Vi som läst boken, tycker att vi sett att vikingarna levde ett osunt och utsatt liv. De satt där på sina skepp och frös i oväder, de skaffade sig sår och skador i bataljer med fiender, de åt mat som var gammal och maskig, och de rodde och rodde, undra på att lederna blev utslitna.



Röde Orm kom i alla fall hem och kunde berätta om alla sina äventyr, det gjorde inte



Almenaŭ Orm la Ruĝa venis hejmen kaj povis rakonti pri ĉiuj siaj aventuroj, ne ĉiuj vikingoj revenis. Mi certas, ke Carolina Bertilsson, helpesploristo ĉe la Universitato de Gotenburgo, ankoraŭ havas multajn esplorojn por fari. Do ni en la Libra Rondo povas konstati ke: – "Orm la Ruĝa" ankoraŭ vivas, almenaŭ en la rakontoj!

alla vikingar. Jag känner mig säker på att Carolina Bertilsson, biträdande forskare på Göteborgs universitet, fortfarande har mycket att forska om än. Så vi bakom Libra Rondo, kan konstatera att:

– Än lever "Röde Orm"!

## Aprila mateno ĉe torfmarĉo – En aprilmorgon vid en mosse



Kiam ni alvenis parkejon 06.15 estis la kantado jam vigla de rubekolo kaj merlo arbarorande kaj la temperaturo verŝajne iomete super la nulo. Gruo aŭdeblis distance. Atinginte la birdoturon apud ponto super la rivereto Săveån 06.30 ni ekvidis tri tetro-kokojn surtere inter pinetoj. Ili iom movis sin, sed ni ne aŭdis tetroludon antaŭ ol 07.30. Post iom da tempo ni vidis la kokojn sune prilumitajn en po pinpinto.

Pasis flugante kelkaj grizaj anseroj kaj kelkaj kanadaj. En Săveån klangulo kaj platbeka anaso. Motacilo moviĝis apud la rivereto. La plej ofta sono krom la tetroludo estis troglodito kaj kantturdo.

Subite ni ekvidis brungorĝan saksikolon sidi sune prilumita en arbopinto. La temperaturo altiĝis iom post iom.

09.25 ni kontentaj lasis la torfmarĉon post agrabla mateno de tetroludo.

När vi ankom parkeringsplatsen 06.15 var det full fart på fågelsången från rödhake och koltrast i skogskanten och temperaturen låg nog strax över nollpunkten. Trana hördes på avstånd. Väl vid fågeltornet intill en bro över Săveån 06.30 fick vi syn på tre orrtuppar på marken mellan små tallar. De rörde sig lite, men vi hörde inget spel förrän 07.30. Efter ett tag såg vi tupparna solbelysta i var sin talltopp.

Det flög förbi några grågäss och kanadagäss. I Săveån knipa och gräsand. En sädesärta rörde sig vid ån. Det vanligaste ljudet från sett orrspelet var sjungande gärdsmyg och taltrast.

Plötsligt fick vi se en buskskvätta sitta solbelyst i en trädtopp. Temperaturen steg efter hand.

09.25 lämnade vi nöjda mossen efter en fin orrspelemorgon.

Teksto kaj bildo: **Jan Hellström**

